La vakciniuja krono. Novelo de *J. Poruks*. Kun la permero de l'aŭtoro el latva lingvo tradukis *P. Kikau*. Paris, Presa esp. societo, 1909. Prezo Sm. 0'20 (pĝ. 30). — Riĉulino kaj malriĉulo — amo kaj disigo — ĝemado kaj rememorado — ŝi estas perforte sendita eksterlanden — li plektas kronon el la vakcinioj kreskintaj sub la pino, kie ili ĵuris al si la eternan amon por rememori la unuan amkunvenon kaj por ornamu la amatinon post ŝia reveno per — vakciniuja krono. Sekve kortuŝanta legaĵo por sonĝemaj geamantoj, kiun tamen povas ĉiuj legi.

Hkb.

Tri rakontoj. Biblioteko de La Verda standardo No 2. Budapest, Lud. Kókai, 1910. Prezo 20 sd. (pĝ. 31). — Tradukoj de tri rankontoj el la magiara literaturo: «Kiu ne povas plori» de A. Berczik, «La Kitklubo» de F. Molnár, «Demandoj konfesaj» de Dr. S. Guthi. Rd.

Analitika geometrio absoluta. Verkis *Dro Cyrillo Vörös*, profesoro de l' piaj lernejoj. Unua volumo: *La ebena Bolyaia*. Budapeŝt, 1910. Eldonis: Ludv. Kókai, Budapeŝt IV, Károly-utca 1, Hungario. Prezo 4 Sm. (pĝ. 132). — Tiu ĉi verko de magiara profesoro estas lernolibro pri geometrio hiperbola, geometria sistemo konstruita de N. Lobačevský kaj J. Bolyai sen la fama kvina postulato de Eŭklid. La verko traktas laŭ metodo analitika sole ebenon hiperbolan. La unua parto estas dediĉita al punkto kaj rekto, ĝi konatigas diversajn koordinataĵojn, transformojn, rektan punktaĵon, rektofaskon, ĝeneraligon de l'elementoj, kelkajn teoremojn koncerne tri-kaj kvarangulojn. La dua parto traktas la konikojn, konatigas la regnon de dualeco, kie teoremoj estas inter si en reciproka rilato. Por faciligi la komprenon al tiuj, kiuj estas ankoraŭ komencantoj en la geometrio absoluta, la aŭtoro komence konigas la tutan formularon de la trigonometrio Bolyaia. La verko estas bela pliriĉigo de la malriĉa (ĉar rizikoplena por eldonistoj) esperanta scienca literaturo. *Bšz.*

Porĉiama kalendaro. Verkis *Török Péter*, profesoro, Debreczen 1910. Kókai Lajos en Budapeŝt. Prezo 20 sd. (pĝ. 22). — En la tempo, kiam oni multe diskutas pri reformo de la kalendaro, kiam oni penas konstrui universalan kalendaron, estas interese legi principojn de l' kalendaro lerte klarigitajn de l' aŭtoro. *Hkb.*

Modela klasifiko de la esperantaj bibliotekoj . . . Originale verkita de *Generalo Sebert*, ano de la Franca instituto. Paris, Esperantista centra oficejo, 1910. Prezo fr. 0.50 (pĝ. 30). — La aŭtoro klarigas en tiu ĉi broŝuro, kiel oni povas apliki en esperantaj bibliotekoj modernan klasifikan sistemon, nome decimalan klasifikon uzatan por la Universala bibliografia repertorio (laŭ la modelo en Centra oficejo esp.). La broŝuro, represaĵo el »Int. scienca revuo«, povas multe servi al la bibliotekistoj esp. *Hkb.*

Pri la indo-eŭropaj lingvoj kaj esperanto. *Th. Cart.* Paris. Presa esp. societo, 1910. Prezo Sm 0,06 (pĝ. 15). — La aŭtoro klarigas tie sian amatan ideon, ke »Fundamento de esperanto« estas artefarita tradicio, de kiu oni ne devas deflankiĝi, se la internacia lingvo ne devas esti ĉiam serĉota, refarota, neprogandebila kaj nepropagandinda. *Hkb.*

La Biblia profeto Cefanjaho antaŭanoncinta esperanton. El la originalo tradukita. Paris, Presa esp. societo, 1910. Prezo: Sm 0.20 (pĝ. 18). — Kelkaj propagandantoj amas montradi, ke jam la biblia profeto Cefanjaho (Zefaniah) antaŭanoncis la lingvon internacian. La plejmulto el ili kredeble neniam aŭdis kaj legis la profetaĵon, pri kiu ili parolas. Jen ili ĝin havas en laŭvorta (eble pro tio iom multepeza) traduko esperanta farita de anonima profesia lingvisto de orientaj lingvoj. Broŝureto vere tre interesa. *Hkb.*

Kvina universala kongreso de esperanto. Paris, Esperantista centra, oficejo 1910. Esperantista dokumentaro: kajero dek-kvara (1, A, 6). Prezo 2 fr. (pĝ. 176). — Jen la oficiala protokolo de nia Barcelona kongreso eldonita de Centra oficejo esp. sub la redakcio de Ch. Chavet. En ĝi estas amasigitaj raportoj pri ĉiuj kongresaj faroj kaj entreprenoj kaj konservitaj ĉiuj dokumentoj rilatantaj la kongreson kaj ĝiajn laborojn. *Hkb.*

La granda monato de esperanto. Biblioteko de La Verda standardo No 1. Budapeŝt, Lud. Kókai (Károlyutcza 1), 1910. Prezo 20 sd. = 50 h (pĝ. 31). — La broŝureto enhavas raportojn (laŭ la

oficialaj protokoloj kaj gazetaj artikoloj) pri la Va internacia kongreso esperantista en Barcelona kaj la esp. kunsido de la XVIa int. kuracista kongreso en Budapeŝt. Rd.

T. E. K. A. Jarlibro 1910. Eldonita de la »Tutmonda esperanta kuracista asocio«. Kötzschenbroda-Dresden, H. F. Ad. Thalwitzer, 1910. Prezo Sm. 0.4 (pĝ. 82). — Unu el la plej seriozaj kaj eble la plej granda el la specialistaj asocioj esperantistaj »Tutmonda esp. kuracista asocio« prezentas al la kuracista kaj esperantista publiko sian duan jarraporton, kiu krom riĉaj informoj pri la laboro, progreso, regularo, organizo kaj anaro de TEKA donas kelkajn interesajn artikolojn (Kiel la sciencistoj staras rilate al esp., Esp. kaj Ruĝa kruco, Pri medicina terminologio, ktp.). La libreto estas bona informilo, sed ankaŭ bona propagandilo. Hkb.

La Langue internationale auxiliaire esperanto. Par M. le Général Sebert, membre de l'Institut. Paris, Office centrale espérantiste, 1910. Prezo fr. 0.25 (pĝ. 14). — La fama propagandanto de esperanto kaj meceno de esperantista movado, generalo Sebert publikigis en »Documents du progrès« (aprilo 1910) bonan artikolon pri esperanto, kiun li nun eldonis broŝure. Hkb.

Esperantaj muzikaĵoj eldonitaj de »Brazila ligo esperantista« riceveblaj de Presa esp. societo (Paris, rue Lacépède 33): *Kanto de l'ekzilo.* Poezio de Gonçalves Dias, esp. traduko de Fr. V. Lorenz, muziko de Querino de Oliveira (prezo 75 ctm.). *Trovita.* Romanco. El Goethe tradukis Grabovski. Muziko de Francisco Braga (prezo fr. 0.75). Rd.

Diversaj eldonaĵoj. — *Estas, do, en kristanismo io valora.* Vera rakonto de s-ino Walter Searle. Prezo de 12 ekz, Sm. 0.5. — *Kvara universala kongreso de esperanto.* Aldono. Esp. dokumentaro 12 (1, A, 5): Raportoj pri la kunvenoj de farmaciistoj kaj UEA en Barcelona. — *Sens et Ĉirkaŭfo.* Gvidlibreto eldonita de Esp. grupo en Sens (Yonne) Francujo. Prezo fr. 0.10. — *Idola fori* (Th. Cart.) Represaĵo el L. J. — *Rumana esperantista societo al la Lingva komitato.* Flugfolia protesto kontraŭ elekto de s-o Fischer en L. k.-on. — *Bukuresta societo »Esperanto« al Lingva komitato.* Letero kontraŭ la flugfolio antaŭa. — *La veron!* (de H. Fischer). Defendo de s-o Fischer kontraŭ protesto de »Rum. esp. soc.« — *Al la Lingva komitato rilate al la movado esp. en Rumanujo* de Dro S. Kimel. Broŝuro defendanta s-on Fischer. — *Rōda korsets esperanto parlār af löjtnant Bayol.* Sveda eldono de ruĝkrucana interpretisto esp. — *Titkári jelentés a Magyar esperantisták társasága 1909. évi működéséről* (de Medgyesi János titkár s. k.) — *Generala katalogo* de Presa esp. societo (Paris, rue Lacedpède 33). — *Katalogo de Moskva librejo »Esperanto«* (Moskva, Tverskaja 28). — *Katalogo de esp. literaturo* de Kókai Lajos en Budapeŝt (Károly-utca 1). — *Konataj medicinaj produktoj.* Reklamfolio de f-o Burroughs Wellcome & Co, London, Anglujo. — *Есперанто. Грамматика и словарь на однім аркуши.* Serba eldono de »Esperanto sur unu folio. Rd.

La Revuo (IV, 8) komencas publikigadi esp. tradukon de la Biblio, propre tiun de la Malnova testamento. La komenco de la traduko mirigas tiel per sia precizeco kaj klareco kiel per sia ĉarme simpla stilo, tial ni multe rekomendas al niaj legantoj la legadon de tiu ĉi verko esperante, ke ni baldaŭ povos anonci ĝian libran eldonon. Ni sincere bonvenigas la fakton, ke la esp. literaturo posedos tiun ĉi verkon, kaj same ĝoje ni vidas, ke la traduko estas farita de Dro Zamenhof mem. Estas certe dubinde, ke tiel bona traduko estus elirinta el la manoj de grupo da specialistoj, kiuj jam dum longa tempo multe gongskribis pri la traduko, sed nenion faris kaj nun ĝoje akceptis la sciigon (ni ankaŭ), ke ilian kolektivian laboron faros indi-

viduo (ni esperu, ke »Esperantista biblia komitato« eldonos almenaŭ Novan Testamenton). Ankaŭ aliaj artikoloj de tiu ĉi n-o (ni kredas la plej interesa el la kuranta jarkolekto) estas legindaj: Selma Lagerlöf (J. Ln.). La senpacaj de S. Lagerlöf (J. Lundgren), Chantecler (Aymonier), Alfortville-Ruinoj (De Lajarte), La ŝtupoj de l'disvolviĝo de la komuneco de helpa lingvo (prof. W. Foerster) k. a. B.

Lingvo internacia. (XV.) — En la 2a n-o estas legebla felietono de J. S. Machar »Cent unua rakonto el Boccaccio«, tradukita el »Ĉas« de H. K. Bouška; en ĝi la aŭtoro, kiu lerte trompis la cenzuriston, priskribas beletrie la tragedian mortigon de l'aŭstria kronprinco Rudolf kaj trafe karakterizas ĉefajn reprezentantojn de Habsburganoj kaj ilian konduton al Bohemoj. — En la 5a n-o estas raporto de s-o Corret pri la katolika kongreso esperantista, pri kiu ni sole mallonge raportas, kaj tiu de s-o Nanni pri la kunveno de itala esperantistaro. B.

Dia regno (III, 5) enhavas nun kelkafoje dum la jaro senpagan muzikaldonon (esperantaj kantoj kristanaj kun kvarvoĉaj notoj por fortepiano aŭ harmoniumo). Ekz. la liujara maja n-o enhavas la kanton »Ho amo, ora sunradi!« (trad. Schattat). B.

La Simbolo (II, 3, 4) enhavas la artikolon pri Bohemujo (»El Ĉeĥlando« de Dro Volkmann) kaj represas nian notizon pri naskiĝa loko de Komenský. »La Simbolo« akceptos interesajn artikolojn el ĉiuj landoj kaj pri ĉiuj temoj. B.

La Propagandisto. Trimonata propaganda folieto. Red. & adm.: London W. C., 135 High Holborn (Internacia propagandejo esperantista), Anglujo. Jarabono 200 spesoj. — Tiu ĉi folieto estas organo de Internacia propagandejo esp. kaj celas konatigi la diversajn internaciajn propagandilojn de esp., precipe la »ŝlosilojn« kaj »tutojn« de Ĉefeĉ. — El la 1a n-o estas videble, ke Ĉefeĉ-ŝlosiloj ekzistas jam en 16 lingvoj (angla, franca, germana, dana, hispana, magiara, itala, portugala, sveda, bohema, rusa, hollanda, rumana, kataluna, pola, finna) kaj Ĉefeĉ-tutoj en 7 lingvoj. Kosto de »ŝlosiloj«: 10 ekz. Sm. 0'20, 100 ekz. Sm. 1'40; kosto de »tutoj«: 1 ekz. 0'4 Sm, 100 ekz. 3 Sm. Riceveblaj en propagandejo. B.

La Semajno. Libera esperantista gazeto. Red. & adm.: Graz I., Burgring 12. III., Aŭstrio. Jarabono: Sm. 3.24 (por Aŭstrio: 6 K) Esperanta gazeto eliranta ĉiudimanĉe en formo de ĵurnalo. — En la 5a n-o estas rakonto »Pri Loretaj sonoriloj« de Jan Neruda (tradukita de G. Koser), kies esp. tradukon (faritan de H. K. Bouška) publikigis jam antaŭlonge »Lingvo internacia« kaj »Le Monde espérantiste«. Ĉu la tradukinto ne povis elekti alian rakonton de Neruda ĝis nun netradukitan? B.

Samideano ĉiumonata. Internacia ilustrita literatura revuo. Red. & adm.: Tokio, 33 Abekawamachi Asakusa (M. Hikosaka), Japanujo. Jarabono: 2,00 yen. — Esp. revuo redaktata de japanaj samideanoj. — La gazeto havas aldonon, kiu enhavas dramon de Maeterlinck »Monna Vanna«. B.

Germana esperantisto. (VII, 5) prave defendas la signifon de la kronika parto en naciesperanta revuo, de la parto, kiujn kelkaj legantoj (ankaŭ niaj) malprave malŝatas. En la aludita artikolo (Redakciaj informoj) J. Borel diras: »Pro la bono de propagando, la kronika parto ĉiam devas okupi gravan lokon en nia ĵurnalo, kvankam tio ne plaĉas al kelkaj legantoj, kiuj dezirus malpli da kroniko kaj pli da esperanta literaturo. La regula raportado pri la progresoj de nia movado en la enlando kiel en eksterlando, kaj la ĝojigaj sukcesoj de nia ideo en la diversaj mondpartoj estas unu el

la plej efikaj propagandaj rimedoj, kiujn ni posedas, kaj restas ĉiam la plej taŭga konvinkilo por dubantoj aŭ skeptikuloj. Bedaŭrinde pro manko da regula raportado de la esperantaj societoj aŭ de izolitaj samideanoj granda parto de tiu intensa movado por esperanto restas nekonata kaj ĝia propaganda efiko perdiĝas. Estas do tre dezirinde, ke ĉiuj laborantoj por nia ideo konigu siajn klopodojn kaj la akiritajn rezultatojn. Ni plene konsentas kaj ni povas diri, ke en la rubriko »Kronika a komentár« (Kroniko kaj komentario) ni vidas la ĉefan parton de nia revuo, la parton, al kiu ni dediĉas la plej grandan atenton, multoble pli grandan ol estas kutime en esperantistaj gazetoj, ĉar la sciigoj pri eksterlanda movado (kiujn ni kritike elektas, koncize redaktas kaj revue ordigas) estas pruvanta kaj konvinkanta dokumentaro por neesperantistoj kaj bona propaganda materialo por esperantistoj (almenaŭ por tiuj laborantaj por disvastigo de esp.), kaj la sciigoj pri enlanda movado (ĉe ni laŭ nia ebleco detale registrataj macilingve kaj koncize resumataj esperante, estas kuraĝiganta montro por ĉiu el ni, ke ni ne estas izolitaj, ke nia laboro ne estas vana, kaj ili estas grava materialo por alilandaj samideanoj kaj venontaj historiografoj de nia movado. Ni eldonas »Boheman esperantiston« tial, por ke ni subtenu, observu kaj registon la *boh man* movadon esperantistan. Se estus la celo de la revuo »facilaj esperantaj tekstoj« (kiujn multaj postulas), oni povus simple rekomendi al la legantoj iun internacian revuon esperantan aŭ libre eldonadi kolekton da rakontoj, kaj ni ne bezonus oferi karan tempon, mortlacigan laboron kaj grandegajn elspezojn por eldonadi *bohem*-esperantan revuon. Tiel oni rigardu la aferon! Al niaj cirkonstancoj ankaŭ respondas jena parto de la sama artikolo: »Pri unu punkto tuŝanta la literaturan parton ni devas atentigi, nome pri la poezio. Kelkafoje ni havis la okazon esprimi nian opinion pri tiu ĉi demando kaj ni konservas la saman vidmanieron post kelkjara sperto. Niaj esperantaj versfaristoj estas multaj, sed ho ve! ni ne povas diri, ke ili ĉiuj produktas ĉefverkojn. Oni eĉ devas konfesi, ke la proporcio de ĉefverkoj aŭ plivere de sole akcepteblaj versaĵoj estas tre modesta kompare kun la grandeco de l' produktado! Unuj poetoj skribas tute malklare, aliaj malzorgas la versregulojn aŭ, kio estas pli grava, kripligas la lingvon. Ĉiuj tiuj mankoj estas mallaŭdindaj kaj ne estas rekomendinde, kuraĝigi tiun emon per publikigo de nekorektaj versaĵoj. Sed se oni akceptas la maloftajn bonajn verkojn, estas malfacile rifuzi la nebonajn, ĉar, kie estas la limo inter bona kaj malbona? Ĝi tute varias laŭ opinio de l' juĝanto. Pro tio, *Germana esperantisto* (ankaŭ »Bohema esperantisto«. R. d. r.) ĝis nun kredeble prave agis enpresante *neniajn* versaĵojn en esperanto. Jen la sola maniero eviti arbitrecajn decidojn kaj riproĉojn pri partieceo«. Niaj vidpunkto kaj konduto estas la samaj kiel de la tre simpatia redaktoro, propre (bedaŭrinde) eksredaktoro de »G. e.« Ĉu la legantoj komprenos nun niajn principojn? Bšk.

The British Esperantist (VI). — En la 63 n-ro estas citita fragmento el »Konfese literáta« de Machar (eltirita el nia kolekto da citaĵoj »El la bohema floraro«). — La 64 n-o enhavas regularon de la ludo elpensita de W. M. Page kaj nomata »Esperanto-kriketo«. — En 65 n-o s-o W. W. Mann detale priskribas la sukcesplenan trian britan kongreson esperantistan (en Cheltenham dum Pentekosto), en kiu partoprenis ĉirkaŭe 400 kongresanoj el ĉiuj partoj de Britujo kaj Irlando. Rd.

Informaj raportoj (IV, 3) en la artikolo »Propagando ĉe la naci-lingva gazetaro« (de J. Ŝ.) konsilas: la unuopaj esperantistoj devas turni sin per skribaj demandoj kaj petoj pri informo pri esp. al la ĵurnalo de ili legata aŭ abonita (ĉiu el alia vidpunkto: ĝenerala, komerca, literatura

k. s.); ili devas skribe aprobi aŭ aplaŭdi la gazeton, kiu publikigas raportojn pri aŭ en esp.; la esp. gazetoj devas sendadi sian gazeton al la plej gravaj nacilingvaj gazetoj de ĉefaj landoj aŭ urboj; la fakaj gazetoj esp. devas sendadi siajn numerojn al nacilingvaj gazetoj de sia fako. La ideo sendadi esp. gazetoj al nacilingvaj gazetoj (en Praha ekz. al »Čas« kaj »Národní Listy«) estas certe bona; precipe efikan rezultaton povus havi esperantistaj gazetoj kun teksto en la tiel nomataj »mondlingvoj« (angla, franca, germana, rusa) en la redakcioj de alilingvaj naciaj gazetoj, kies redaktoroj povus ĉerpi kaj certe uzus la informojn el nacilingva parto de la gazeto (pri tio ni havas la sperton) pli kompleze ol la informojn ricevitaĵojn de lokaj esperantistoj. *Rd.*

Pola esperantisto (V, 4—5) en la raporto pri agado de »Pola esperantista societo« dum la jaro 1909. konstatas, ke la propra esperanta pavilono en la industria kaj komerca ekspozicio en Czeŝtoĥova forte interesis ĉiujn vizitintojn kaj ricevis rekompencan en formo de distingita diplomo. Ankaŭ granda publika koncerto kaj parolado okaze de 50a jubileo de Zamenhof sukcesis bonege (600 enestintoj!) *Rd.*

Lumo. Oficiala organo de la »Bulgara esperantista ligo«. Red. & adm.: Popovo, Bulgarujo (Ks. Jankov). Jara abonpago Sm 1, 40. — Post kelkaj malsukcesintaj provoj eldonadi bulgaresperantan gazeton, oni komencis eldonadi novan gazeton portantan la nomon jam kelkafoje vidatan sur esperantista gazeto. La fakto, ke la gazeto komencas sian 3an jarkolekton donas ĝojigan esperon, ke ĝi havos — ni sincere tion deziras al ĝi — multoble pli longan vivon ol havis ĝisnunaj bulg.-esp. gazetoj kaj gazetoj kun titolo »Lumo«. Multan sukceson! *Rd.*

Kataluna esperantisto. Monata organo. Oficie la organo de la Kataluna esperantista federacio. Red. & adm.: Sabadell-Barcelona, str. Gracia 12, Hispanujo. Jarabonpago: ? — Post »Tutmonda espero« aperas dua katalunesperanta revuo; oni vere povus ĝoji, se la nombro de katalunaj samideanoj estas tiel granda, ke ili povos vivoteni du propagandajn revuojn. — En la 2a n-o oni plendas: »Malgraŭ nia jam riĉa literaturo oni de tre longe en ĝi rimarkis grandan malplenan, des pli malfacile plenigeblan ju pli malfrue oni ĝin ekelizos. Mi rilatiĝas al nia preskaŭ nula originala literaturo«. La aŭtoro verŝajne ne komprenas, ke la bonajn (kaj la malbonajn oni ne voku!) originalajn tekstojn povas fari *veraj verkistoj* kaj eĉ ankoraŭ inter ili sole tiuj, kiuj estus trapenetritaj per spirito de internacia kulturo kaj povus sekve senti la bezonon verki Internacilingve. Kaj kiom da tiaj verkistoj la esperantistoj gajnis? En la respondo al tiu ĉi demando estas ankaŭ klarigo al la plendo de l'aŭtoro. *Rd.*

Serba esperantisto (Есперантиста српски). Propaganda kaj oficiala monata organo de la societo. Red. & adm.: Belgrado (Serbujo), Pop Lukina 4 (ing. D. M. Andonović). Abonpago jare: 2 Sm. — Propagandi esperanton inter Serboj, konigadi al fremdaj esperantistoj serbajn literaturon, landon, nacion, historion ktp. estas celo de tiu grandformata gazeto. — En la 1a n-o astas represita la tuta konata propagandilo »Esperanto sur unu folio« serbe. *Rd.*

Paris-esperanto (IV, 36) publikigas en sia anonca parto 18 francaj gazetoj, kiuj subtenas la propagandon de esp. (L'Aéro, L'Avion, Mon chez moi, Comoedia, Concordia, L. Eclair L'Humanité, La Guerre sociale, La Petit république, L'Intransigeant, Le Journal, La Liberté, Le Matin, Le Petit journal, Le petit Parisien, Armée et Marine, Les Sports, L'Oeuvre). Ĝojinde estas, ke inter ili estas kelkaj gravaj kaj tre disvastigitaj ĵurnaloj ankaŭ fremdlande legataj. *Rd.*

Grekingva esperantisto (11.), kiu titolo estas la nuna de l' antaŭa »Grekingva esperantano,« proponas jenajn signojn por esp. literoj super-signitaj en telegrafia alfabeto de la sistemo Morse'a: ĉ — — — —, ĝ — — — —, ĥ . . . — —, ĵ . — — — —, ŝ . . . — —, ŭ . . — — . . .
Rd.

Esperanta gazeto. Organo de Akcidenta esperantista societo. Red. & adm.: Guadalcijara (Mékiko), Morelos 995, Ap, 115. Abonpago Sm 1, 25. — Malgranda duonmonata meksika gazeto en lingvoj hispana kaj esp.
Rd.

Anda lumo. Oficiala organo de »Tachira esperanta societo«. Red. & adm.: San Cristóbal, Venezuela. S. A. Abono: ? — Propaganda revue por Venezuelo.
Rd.

Bulletin officielle de la Société française pour la propagation de l'espéranto. Red. & adm.: Paris, rue Lacépède 33. Kotizaĵo fr. 2'50. — Monata bulteno de franca societo por propagando de esp. enhavanta ekskluzive ĉiuspecajn societajn raportojn ekz. pri kunvenoj, ekzamenoj, aliĝoj, festoj ktp.
Rd.

L'Espérantiste catholique illustré. Organe espérantiste mensuel des cercles, patronages, institutions et associations catholiques. Red. & adm.: Office espérantiste catholique, Paris, rue Béranger 10. Jarabono; 3 fr. — Franc-esperanta revuo por katolikoj redaktata de Cl. Colas, redaktinta »Esperon katolikan«.
Rd.

Esperanto et Croix Rouge. Bulletin de la S. F. E. C.-R. Red. & adm.: Centra esp. oficejo Paris, rue Clichy 51. Abonpago jare: 1 fr. — Inter la francaj partianoj de Ruĝa-Kruco trovis esperanto tiom da adeptoj, ke oni povis fondi (1908) specialan societeton de francaj esperantistoj-ruĝokrucanoj (Société française Esperanto-Croix-Rouge), kiu de nun (1910) havas ankaŭ sian specialan organon en lingvoj franca kaj esperanto. — En la 1a n-o oni legas interesajn raportojn de oficialaj delegitoj (Ad. Moynier kaj Dro Straub), kiujn ili donis pri la 4a kongreso esp. al siaj ĉefuloj, poste la priskribon de publika ekzercado de vundithelpado kaj de kunsido ruĝokrucana dum la 5a kongreso esp.
Rd.

Rund um die Welt. (1., 2, 3) publikigas en sia multlingva parto (Esperanto als Dolmetsch, E. kiel interpretisto) artikolon de bohema samideano G. Kratochvíl »Jak lze prakticky užiti esperanta na cestách«. Estas interese vidi, ke el la kvar tekstoj la tekstoj bohema kaj esperanta estas tre malpli longaj ol tekstoj germana kaj franca.
Rd.


Gramatiko de ile. Kompozita de A. Seidl. Berlin-Steglitz, Paul Scheufelein, 1909. Preco 10 pfg. = 12 hal. (pĝ. 20). — Unu el ĉefaj propagandintoj de ido, »duesma prezidero di la uniono por internacia lingvo helpanta Berlino«, A. Seidl, trovis ankaŭ en ido multajn mankojn kaj malbonaĵojn kaj li kreis novan projekton »ile«. En tiu ĉi broŝuro estas mallonga gramatiko de la »nuva internacia helplinguo«, »kun multa teksti e vortaro«,
B.

L' Elpilingue. Revue por le diskussion de le kuestiones relativ a le mundilingual probleme. Red. & adm.: A. Seidel, Steglitz-Berlin, Miquelstr. 21. Abonpago (12 n-oj) 2 M. — Revueto eldonata en la lingvo »ile« (reformita »ido«), redaktata de la kreinto de »ile« pliboniginta »idon« kaj propagandanta nun tiun ĉi »l'elpilingue« en la konvinko, ke ĝi estas pli bona ol esperanto kaj ido. — En la 1s n-o estas artikoloj: Nostr programme, Ile e Unial, le nome »lle« (internationale lingue ktp.
B.

Ricevitaj gazetoj. — *Oficiala gazeto esperantista* (11, 8, 9, 10, 11): Kandidatoj al la Lingva komitato. Pri la prefikso »Mis«. Internacia scienca asocio esperantista U. E. A. Ĝenerala raporto pri proponoj de gramatikaj neologismoj. — *Internacia scienca revuo* (VII, 74, 75, 76, 77, 78): Muzikteorio (elementaj principoj). La internacia karto de Terglobo. La kometo de Halley. — *La Revuo* (IV, 7, 8, 9, 10): Nekonitaj opinioj de eminentaj homoj (F. Pujulà y Vallès). — *Lingvo internacia* (XV, 1, 2, 3, 4, 5). Pri kunedukado. Movado en Britujo kaj Francujo en 1909. »Absurda«. Impresoj pri moderna Japanujo. — *La Duonmonnata* (1, 9—10, 11—12, 13, 15—16): El rememoroj pri esp. 1887—89. — *La Simbolo* (11, 1, 2, 3, 4). — *Esperanto* (VI, 72, 73, 76): El la historio de skribo. La internacia organizo kaj la internaciaj asocioj. Nova projekto pri la unuigitaj ŝtatoj de la mondo. — *Vojo de kuracistoj* (III, 4, 5, 6): Internacia enketo pri mortpuno. — *Internacia socia revuo* (IV, 3, 4, 5): Pri la enkonduko de seksuala problemo en sociologio. La religio kaj la liberpensuloj. Per interna forto (El bohema »Volná myšlenka«). La antimilitarismo. Kion volas Nov-Malthusismo? — *Bulteno de Libera penso* (5, 6, 7—8): Kontraŭ la milito. Kateĥismo de liberpensulo. — *La Propagandisto* (1, 1, 2). — *Nova sento* (11, 9, 10, 11, 12): Esperantigu la infamojn. Seninfaneco. Fraŭlegeco. — *Semo* (1, 2, 3). — *La Semajno* (1, 1, 2, 3, 4, 5, 6). — *La Spritulo* (11, 6, 7). — *Dia regno* (III, 5). — *Verda stelo internacia* (1, 5—6). — *Juna esperantisto* (VIII, 2, 3, 4, 5): Al la junularo (Tolstoj). Macocha (Halamášek). — *The British Esperantist* (63, 64, 65, 66). — *Germana esperantisto* (VII, 3, 4, 5, 6); Esp. kaj la vivo internacia. Esp. inter junuloj. Pri kalendara reformo. Evoluciaj gradoj de la helplingva komuneco. Reklame durch Esp. Der grüne Stern. — *Pola esperantisto* (V, 1—2, 3, 4—5): El rememoroj pri esp. 1887/89 (Grabowski). Interslava-esp. kongreso. Pri esp. fonda kapitalo. Libera ligo por defendo de tuthomaraj intereso (el »Čes. esp.«). Internaciaj signoj por metrosistemaj mezuroj. — *Informaj raportoj* (IV, 3, 4). — *Svisa espero* (VIII, 2). — *Rumana esperantisto* (II, 4, 5—6). — *Kroata esperantisto* (II, 2, 3, 4). — *Tutmonda espero* (III, 27, 28, 30): Al la solvo de la financa demando. — *La Suno hispana* (VII, 75, 76, 77). — *Ekho esperantista* (V, 45, 46, 47, 48): La loĝeja mizero. Kiam esperanto estos oficiala. — *Germana gazeto esperantista* (III, 4, 5, 6, 7, 8, 11): Averturado kaj leĝodonado. — *Rumana gazeto esperantista* (III, 3, 4—5). *Hungara esperantisto* (1, 11—12, 11, 1, 2): Parolado de T. Roosevelt. — *Belga esperantisto* (11, 6). — *Kataluna esperantisto* (1, 1, 2). — *Norvega esperantisto* (11, 2, 3). — *La Holanda pioniro* (11, 6, 7, 8). — *La Ondo de esperanto* (1910, 3, 4): Esp. kaj L. Tolstoj. — *Finna esperantisto* (IV, 1—2). — *Esperanta gazeto* (11, 14, 16, 17—18). — *Gazeto andaluzia* (1, 3). — *Greklingva esperantisto* (11, 1, 2, 3, 4): En la lasta horo (Fr. Novák). — *Lumo* (III, 3—5, 6—7): Kiel Propagandi? B. A. E. — *Serba esperantisto* (1, 1). — *Paris-esperanto* (IV, 36, 37, 39): Pour le latin, pour l'espéranto. — *Sarta stelo* (III, 21, 22). — *Normanda stelo* (III, 3, 4, 5, 6): Les relations internationales. — *Norda gazeto* (III, 14, 15, 16, 17, 18). — *Anda lumo* (1, 1). — *Bulletin officiel de la S. f. p. d. e.* (1, 1). — *L'Informilo* (7): Esp. et les langues vivantes. — *Japana esperantisto* (IV, 12, V, 1): Aeroplano da kap. Hino. — *Antrauen esperantistoj* (VII, 3). — *La du steloj* (11, 9—10). — *Verda stelo* (III, 2, 3, 4). — *Kolombia stelo* (1, 4, 6). — *The Australian Esperantist* (11, 13). — *L'Espérantiste catholique* (1, 2). — *The esperanto Instruktor* (III, 35). — *Juneco* (1, 5, 6, 7). — *Esperanto et Croix-Rouge* (1, 1). — *Rund um die Welt* (1, 3, 4, 5). — *Idealisto* (1, 2). — *Progreso* (III, 1, 2). — *Academia pro interlingua* (XXII, 1—2, 3). — *L'Elplingue* (1, 1).

Rd.

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

 **Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!**



Esperantské nálepky

100 kusů poštou vyplaceně za K — 70
500 » » » » » 2 70
Bez poštovní zásilky o 10 hal. méně.

Esperantaj glumarkoj

100 ekzempleroj Sm. — 35
500 » » » 1 40

liverataj de **J. Iglauer, Praha III.-495, Bohemujo.**

Knih tiskárna :: POLITIKY :: v Praze, Václavské nám.

Zhotovuje veškeré tiskopisy od nejmenších do nejobsáhlejších, a rozsah závodu, bohatý výběr písem i ozdob, nejdokonalejší stroje a dobré odborné síly umožňují dodávat tiskopisy nejen elegantně, ale i slohově upraveně. Rozpočty na požádání ihned se podají. Vyřídí veškeré zakázky rychle, za ceny mírné. Zhotovuje knihy a brožury všeho druhu: díla matematická, cizojazyčná a díla ve všech slovan. jazycích, uměl. alba, katalogy, cenníky, prospekty, doporučenky, tabele, účty, dopisní papíry, obálky dopisové se záhlavím; plakáty, divadelní cedule; tiskopisy příležitostné, navštivenky, svatební a promoční oznámení, pozvánky atd. Sklad tiskopisů pro spořitelny.




FR. SKRČENÝ

V PRAZE, VODIČKOVA ULICE 32.

Filiálka: Příkopy, č. 27 n. „Velký Bazar“

doporučuje ve velkém výběru za velmi levné ceny:

Lampy, lustry, ampule, sklo, sklenice na pivo, víno, vodu a likéry. **Porculánové** příbory jídelní, na kávu a čaj. **Domácí a kuchyňské nádobí. :: Úplné vybavy pro nevěsty. :: Cenníky zdarma.**

 **Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!**

Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice esperanta.** Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 2. **Slovníček esper.-český.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka — Cena 30 h, poštou 33 h.
Sv. 4. **Methodická učebnice esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky) Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátě K 1'10, poštou K 1'20.
Slovník česko-esperantský (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka Cena 90 h, poštou 95 h.

Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice esperanta.** Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1'50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de esperanto**“.
Sv. II. **Slovník esper.-český** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2'50, poštou o 10 h více.
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.

Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Český esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5'50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zapravení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostýn, Morava.**



JOSEF MALÝ,

Praha VII., Na Výšinách

fabrikas specialan komodan matracon
»Esperantan komodon«. Presarojn kaj
☆ informojn oni donas senpage. ☆

La plej saniga trinkaĵo estas tutmonde konataj senalkoholaj **ŝaŭmantaj limonadoj bonbonoj de Maršner** (kun gusto framba, citrona, fraga, ĉeriza) por preparo de bonega refreŝiga senalkohola trinkaĵo.

Nefalsita sole
kun jena
protektmarko.



Nefalsita sole
kun jena
protektmarko.

Ĉie ricevebla, kie estas aŝioj kun protektmarko, kiu estas sur ĉiu aparta bonbono. Jara produkto 60 milionoj da pecoj. **Lu-Sin** parfumas la spiron. **Klairon**, la plej ŝatata frandaĵo de nova tempo. **Bouchées à la reine**. **Peppermint-Lozenges**. Ĉiujn specojn de ĉokoladoj laktaj, kuirotaj kaj frandaj la plej bonkvalitaj proponas

První česká akc. společnost továren na orientálské cukrovinky a čokoládu na Král. Vinohradech dříve **A. Maršner** (Unua bohema akcia societo de fabrikoj de orientaj sukeraĵoj kaj ĉokolado en Král. Vinohrady, Bohemojo, antaŭe A. Maršner).

Vendejoj: **Praha I., Ferdinand. tř. (Platýz). Praha II., Václavské nám. Wien VI., Theobaldgasse 4.**

BOHEMA ESPERANTISTO

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Redakce a administrace: Praha III, Kampa 495.

Redaktor:

H. K. Bouška,
Praha-Smíchov 1097.

Vydavatel:

Jan Iglauer,
Praha III, Hroznová 6.



ROČNÍK IV

SEŠIT 9

Články. — Artikoloj.

Dr. L. L. Zamenhof-Karel Maršík: *O vzniku esperanta.* — Dr. Stan Karmarýt: *Optimismo.* — Alois Jirásek-Jos. Barviř: *Konscienco.* — K. J. Erben-B. S. E.: *La ora trezoro.*

Kronika a komentář.

První schůzka moravských esperantistů. Rakousko-uherské ministerstvo železnic a esperanto. První mezinárodní sjezd katolíků-esperantistů. Subvence městských rad esperantistům. Rozmanitosti z esperantského hnutí. Esperanto na vyšší dívčí škole v Přerově. Esperantské informace o Prostějově. Den esperantistů na výstavě v Nasavrkách. České přednášky o esperantu. Kursy esperanta pro Čechy.

Zprávy spolkové.

Svaz českých esperantistů. Klub esperantistů v Liboci-Hvězdě.

PRAHA, 31. VII. 10.

Cena 36 h

PSACÍ STROJE — SKRIBMAŠINOJ

nové i opotřebené, všech systémů, výhodně a se zárukou dodává firma novaj kaj bezonitaj, ĉiusistemaj, plej oportune kun la garancio estas liverataj

de firmo F. Tůma, Praha,

Jindřišská ulice čis. 26, Čechy. (Bohemujo.)

Zásilky pro „S. ĉ. e.“ adresujte: Mil. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

Celoroční předplatné 4.— K.

Ĉeský esperantista-Bohema esperantista

(Red. kaj adm.: Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; Jarabono Sm 1'70) monata revuo por propagando de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de „**Bohema asocio esperantista**“ (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 20-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzoj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesataj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas rapidan respondon letere, aldonu poŝtmarkon. Specimenon oni sendas kontraŭ unu respondkupono.

Listárna redakce. — Pro nedostatek místa odkládáme většinu obvyklých rubrik do příštího dvojčísla, které vyjde začátkem září. — V posledním čísle nedopatřením byly některé zprávy zařaděny do nepřislušných rubrik, což opraveno bude v přehledu obsahu. — P. Balcar, Szm. Adre y časopisů a výši předplatného uvádíme vždy, když list poprvé registrujeme; mohli jste tedy sám příslušné údaje vyhledat si v revui (Samideano ĉiumonata Sm 2'75, Japana esp. Sm 1'60, The British esp. Sm 1'50, Lumo Sm 1'40, Kataluna esp. Sm 1'20, Esp. gazeto Sm 0'75, Anda lumo Sm ?, Paris-esp. Sm 0'60). — P. prof. Frdr., Čeladná. Dík za pozdrav i uznání! Zašleme dopis.

Peto al la amikoj, kiuj partoprenis en la Wien'a esperanto-tago. El la raporto pri la esperanto-tago en Wien, en kiu mi ne povis partopreni estante alie okupita, mi vidas, ke s-o Kühnl parolis pri „B. asocio e.“ „Boh. esp.“ kaj gvindantaj personoj en la asocio. La detaloj pri tio, kion li diris, mankas kaj tamen estus dezirinde scii, kion li diris al tiom da homoj, kiuj ne konas lian karakteron kaj sekve povus kredi al li. Tial mi petas ĉiun veramanton, kiu aŭdis la „parolon“ de s-o Kühnl, ke li bevolu afable sciigi al mi, kion li memoras el la diroj de s-o K. Oni skr.bu sincere, ĉar oni povas fidi mian diskretecon kaj konservon de redakcia sekreto. Koregan dankon antaŭe!

H. K. Bouška, t. t. Malé Čejtice, Bohemujo.

„Zájmy všelidské“, čas. propagující organizaci všeho lidstva (orgán pacifistů, abstinentů atd.), změnilo redakci (Smíchov 1074) a snížilo předplatné (3 K ročně). 1. čís. III. roč. vyjde 15. září 1910. Doporučujeme.

O kometách (Naps. Longinus. Vyd. „Volná myšlenka“ na Král. Vinohradech. 30 hal.) Pěkný populární výklad o kometách, o jich původu, složení, počtu, velikosti, vlivu atd. Vyklad předchází poutavý úryvek z dopisu Bož. Němcové.

Losy věčné loterie „Spolku pro stavbu laciných a zdravých obydlí v Brně“ (los à 1 K, hl. výhra v ceně 20.000 K) vzhledem k humanitnímu i solidárnímu účelu i snaživosti pořadatelů doporučujeme všem čtenářům naší revue.

Tvorstvo a člověk. Napsal Al. Studnička. Vyd. I Spolek k ochraně zvířat pro král. Čes. (Cena 30 h. Na skladě u každého knihkupce.) Zajímavé uvedení do tajů života zvířectva s ušlechtilou ten encí zameziti ukrutnosti páchané na zvířatech.

O kometě Halleyově a o řadě jiných zajímavých temat přineslo důkladná pojednání, pětičíslo „Zájmy všelidských“, jímž ukončen II. ročník (cena 2 K).

Esperantská korespondence — Esperanta korespondado.

Jednonásobné otištění oznámení stojí 60 h., trojnásobné K 1'50. Členové svazu a spolku sdružených platí pouze 40 hal., resp. 1 K. Pro přímé předplatitele je prvé otištění zdarma. — Vyměňovati dopisy¹⁾, pohlednice²⁾, pošt. známky³⁾, přeji si:

La unufoja enpresado de l' anonco kostas 25 sd. trifoja 63 sd. La anoj de l' asocio kaj aligitaj societoj pagas sole 17 sd, resp. 42 sd. Por la abonintoj la unua enpresado estas senpaga. — Interŝanĝon de leteroj¹⁾, ill. poŝtkartoj²⁾, poŝtmarkoj³⁾ deziras:

67. Zdeněk Misar 146, poste rest. Praha, hl. pošta. Ĉiam kaj tuj respondos¹⁾²⁾. — 68. L. Vvedensky, élévo de 4-a klaso I. gimnazio Voroněž, Rusujo³⁾. — 69. S-ino Eufr. D-ro Robin, 5 str. I. C., Bratianu Bukuresti, Rumanujo, deziras korespondadi nur por belaj i. p. k. naciaj kostumoj; respondos al ĉiuj. — 70. S-ro Vasilij Běloglasov, Neděždinsk, Permskaja gub. Rusujo¹⁾³⁾. — 71. S-ro Michel Trojmovici str. Cuza Voda 40, Jasi, Rumanujo³⁾. — 72. S-ro Friedrich Knopf, Magdeburg B, Freiestr. 9, Germanujo¹⁾²⁾. — 73. H. Th. Thomssen, Stollmackerstr. 6, IV. Kristiania, Norvegujo. — 74. V. Ráliš, Zaclér č. 18, Bohemujo-Aŭstrio. Ĉiam kaj tuj respondos.

O VZNIKU ESPERANTA.

Výňatek z dopisu *Dra L. L. Zamenhova* N. Borovkovi. Z esperanta přeložil
Karel Maršík. — (Dokončení.)

Ještě jedna okolnost přiměla mne, abych na dlouhou dobu odložil veřejné vystoupení s jazykem: po dlouhou dobu zůstávala nerozřešena jedna otázka, která má obrovský význam pro neutrální jazyk. Věděl jsem, že každý mi řekne: »Váš jazyk bude mi užitečný teprve tehdy, až celý, celý svět jej přijme; proto jej nemohu přijmouti až tehdy, až jej přijme veškerý svět.« Ale, poněvadž »svět« není možný bez předchozích jednotlivých »jednotek«, jazyk neutrální neměl míti budoucnosti až tehdy, kdy se podaří učiniti jeho užitek pro jednotlivce nezávislý od toho, zda již jest jazyk přijat světem čili nic. O této otázce jsem dlouho myslel. Konečně tak zvané tajné abecedy, které nevyžadují, aby svět je dříve přijal a umožňují zcela nezasvěcenému adresátu, aby porozuměl všemu vámi napsanému, jestliže jen předáte adresátu klíč, — přivedly mne na myšlenku, abych upravil jazyk také na způsob takového »klíče«, který, obsahuje v sobě nejen celý slovník, ale i celou mluvnici ve tvaru zvláštních, zcela samostatných a abecedně seřazených prvků, umožnil by zcela nezasvěcenému adresátu kteréhokoliv národa porozuměti ihned vašemu dopisu.

Ukončil jsem universitu a počal svou lékařskou praxi. Nyní počal jsem již mysliti na veřejné vystoupení se svou prací. Dohotovil jsem rukopis své první brožury (*Dro Esperanto* »Lingvo internacia. Předmluva a úplná učebnice«) a počal jsem hledati nakladatele. Ale zde narazil jsem poprvé na trpkou praxi života, na peněžní otázku, se kterou jsem později ještě mnoho musel a musím silně bojovati. Po dvě léta marně jsem hledal nakladatele. Když už jsem jednoho našel, on po půl roce připravil mou brožuru k vydání a na konec — odmítl. Konečně, po dlouhém úsilí, podařilo se mně samostatnému vydání svou první brožuru v červenci roku 1887. Byl jsem velice rozrušen před tím; cítil jsem, že stojím před Rubikonem a že ode dne, kdy objeví se má brožura, nebudu míti možnosti ustoupiti; věděl jsem, jaký

osud očekává lékaře, který závisí od obecnstva, jestliže toto obecnstvo vidí v něm snílka, člověka, zabývajícího se »vedlejšími věcmi«; cítil jsem, že dávám v sázku svůj budoucí klid a bytí své i své rodiny; ale nemohl jsem opustiti myšlenku, která mi přešla do těla i krve a... já překročil Rubikon.



OPTIMISMO.

Meditoj de *Dr. Stan Kamaryt*. — (Fino).

Sed la periodon dekadencan karakterizas krom la dirita multo da pensoj ankoraŭ alia eco: rapideco de progreso, la frapanta specialeco de lastaj 50 jaroj. La periodo komencis en la okcidenta Eŭropo proksimume en la jaroj ĉirkaŭ 1880, en la meza kaj orienta Eŭropo en la jaroj ĉirkaŭ 1890 kaj nun la periodo jam ne ekzistas. Propre la periodo daŭras, sed la nomo dekadenco malaperis kun malĝoja anima depreso de poetoj, ĉar ĝi ne taŭgis por periodo tiel bela kaj tiel glora. La eminenta kultura situacio de la homaro post la fino de la klasikismo, kaŭzis komence malgajan humoron de tiamaj pensuloj; kaj pensulo estis tiam, antaŭ 30 jaroj, ĉiu. Oni konsciiĝis, ke homaj kono kaj sentoj, plaĉo, ĝojo ne havas absolutan valoron, kaj ke estas sen reala kaŭzo, kian valoron oni aljuĝas al ili. Kiel dogmo estis proklamita logika eraro, ke ni povas projekcii en la eksteron niajn imagojn ŝanĝitajn per laŭvola almeto de imagoj alie aperceptitaj, kaj ke tiel ŝanĝitaj imagoj, havas la saman rajton je kredindeco kiel la imagoj, kies reprodukto akordiĝas kun ilia loko kaj sekvo dum aperceptado kaj kun maniero reprodukta de aliaj homoj. Oni tute forgesis, ke oni malmulte pravas en tiu ĉi juĝo pruvinte sole la fakton, ke niaj imagoj ne estas al ni donitaj senmedie. Tiu konscio kaŭzis ian, ĝis nun ne difinitan malĝojon. La junaj homoj estis nekontentaj pro tio, ke ili ne havis ion por labori. La problemoj pri rilatoj de individuoj unu al alia kaj al ĉirkaŭo solviĝadis aŭtomate; la socia organizo estas ja jam tiel brila, ke ĉe unu triono da homaro aferoj de besta vivo preskaŭ neniel tuŝas la spiritan vivon, tiom pli malmulte pleningas ĝin. Kaj starigi al si la celon, kiu valorus por vivi, ne estis poveble. Estis neagrable rezultato de alta kulturo. Sed tiu ĉi malĝoja humoro estis baldaŭ venkita kun rapideco de moderna progreso kaj la homaro komencis konsciiĝi pri bezono

kredi je vereco de homa kono, kredindeco de homaj silogismoj. Oni trovis, ke supozi, ke la homaro degeneras, havas neniun argumenton. Oni rimarkis, ke dum la periodo de universala ĥaoso en cerboj kaj en koroj estis unu sola klaso de homoj, kiuj ne partoprenis en ĝenerala diskutado kaj kiujn pli multe ol bataloj pri Darwin interesis la longeco de fervojo de Petersburg ĝis Wladiwostok, aŭ maŝinoj por trabori tunelojn tra Alpoj. Estis teknikistoj. El tekniko eliris la savo.

Ĉar pripensante ĝiajn sukcesojn oni ne povis kuraĝi diri, ke tiu homaro, kiu ekokupas aeron, estas malpli laborkapabla ol antaŭe. Kial supozi, ke tia homaro degeneras? Tiel disvastigadis la konvinko, ke estas bezone kredi realecon de raciaj silogismoj. Tio signifas revivigon de racionalismo kaj evoluo de kulturo iras nun laŭ tiu direkto.

La priskribita turno bazas tre firme kaj profunde en logiko de historio. Atentu sole la fakton, ke ĉiuj partioj kaj ideaj movadoj senigas sin de entuziasmo, do de elemento senta. Ju pli partio aŭ movado fariĝas pli serioza, pli prilaborita, pli preciza, des pli multe valoras ĉe ĝi logiko de pensado kaj des pli publike estas eligataj elementoj sentaj. Novaj movadoj ordinare komencas en sento, evoluas al logiko. Kristaneco, kiu komencis kiel senta kontraŭstaro kontraŭ subpremado de malfortuloj kaj senkonscia rebato kontraŭ delikateco kaj komplikeco de tiama kulturo, transformiĝis ĝis protestantismo, kiu kreis etikon en intelektaj fundamentoj. Individualiĝo de nacioj komencas dum entuziasmo, kiu poste faras lokon al progresema kritiko, kiu metas kontraŭ tezojn aprobitajn de entuziasmo, tezojn aprobitajn de racio. Nacionalismo transformiĝas en ŝovinisman kaj fariĝas rifuĝejo de konservativuloj kaj malprogresemaĵoj. Progresemaĵoj kunmetas liberalisman en la plej vasta senco, kaj bazas en kritiko, do en argumentoj raciaj. Simile socialismo de Lassalle, kiu vokis proletariaron sur straton, transformiĝis en socialisman de Bernstein, kiu laboras en parlamento per logiko. Ĉio montras, ke tendenco de hodiaŭa kulturo estas racionalisma kaj individualisma; ĉiu havas rajton preni la parolon kaj ne estas poveble ne aŭdi lin, se li havas ion por diri.

Unu en moderna racionalismo ne estas racionalisma: kredo je racia silogismo. Sed tion ĉi neniuj volas pruvi. Tio estas voleca elemento de la moderna racionalismo. Ĝi povas esti enkondukita en ĝin sole per kredo je realeco de homa

kono. Ĝi estas elemento senta, kaj kredi je ĝia rajtigiteco nomiĝas optimismo; esperantistoj devas kredi je ĝi, sekve devas esti optimistoj; esperantismo pesimisma estas »contradictio in adjecto«. Racionalismo estas ĉiam optimisma kaj estas karakterize por esperantismo, ke ĝiaj propagandantoj tiel fervore deziras kunhelpon de ŝtato. Estas nature, ĉar racionalismaj sociaj movadoj por prosperi bezonas fortan progreseman registaron.

Tiu ĉi optimisma racionalismo estas moderna; ĝi signifas sanon de la socio, ĉar la socio por perfektigi bezonas absolute, ke ekzistu kaŭza rilato inter kaŭzo kaj rezultato, ĉar sole tiu ĉi rilato donas al homo la forton labori por morgaŭ. Estas bezone, ke homo ne perdu la kredon, ke lia laboro alportos profiton al liaj infanoj. Sed la kredon li povas havi sole tiam, se li scias, ke logikaj silogismoj havas almenaŭ ioman realan valoron.

La novajn vivindaĵojn oni ĝis nun ne trovis; sed oni trovis la vojojn, per kiuj oni ilin trovos. Simpligo de komplikitaj cirkonstancoj kaŭzita per tio, ke la civilizacio evoluas diversloke kaj diversmaniere. Tion volas internaciaj ideaj movadoj, kiuj havas ekskluzive praktikan celon: libera komerco, esperantismo, libera penso, abstinentismo, pacifismo. Ili povebligas al nova homaro fariĝi feliĉa.



KONSCIENCO.

Rakonto de *Alois Jirásek*. El la bohema lingvo tradukis *Jos. Barviř*.

I.

Herboriĉa, malprofunda valo aperis klare en la plena suna brilo.

En ĝia senkoloriĝinta herbaro tremis floroj de kolĉiko*) kaj flekseblaj, brilantaj fadenoj de aŭtunaj araneaĵoj.

Tra la valo sur flave lumigita herbaro treniĝis longa ombro. Ĝi estis de franca soldato el armeo de Granda Napoléon.

La soldato, apartenanta al la ĉasista infanterio de l'imperiestro paŝis malrapide, lace. Liaj botoj kaj gamaŝoj estis kotumitaj kaj ankaŭ lia mantelo estis plena de jam sekigantaj kotmakuloj.

*) Ne estus pli bone: kolkiko? *La red.*

La soldato ĉiumomente haltis. Li eble tiel ripozadis kaj ekspiradis, sed li ne sidiĝis; li sole ĉirkaŭrigardadis. Liaj kaviĝintaj, febre flamantaj okuloj serĉis ian helpon. Sed ili nenion ekvidis. Ĉie, dekstre, maldekstre super la valo plugitaj kampoj kaj tiuj malhelpis rigardi malpli proksimen en pejzaĝo. Restis sole iri pluen ĝis la fino de la valo, fino certe proksima.

Sole unufoje la soldato elpaŝis pli rapide, kiam li flanke sur deklivo ekvidis du arbetajn de sovaĝaj rozoj. Ili tremis en la aŭtuna vento kaj iliaj ruĝaj fruktoj brilis sub la suno. La soldato rapide ŝiregis de branĉetoj iom da tiuj ĉi fruktoj kaj rapide, eĉ furioze ilin ekmanĝis.

Sed li ne trankviligis la malsaton. Tiu ĉi maldolĉa gasto, akompanis lin jam kelkajn tagojn kaj ĝi ne volis lin forlasi. Vaganta soldato travivis en valetto kvin tagojn kaj kvin noktojn en terura streĉo, malfacila servado preskaŭ tute sendorma, kaj kruela tritaga batalado apud Leipzig, ne kalkulante laciĝon de pasintaj marŝoj kaj krom tio teruran malsaton. La lastan tagon de batalo kaj poste dum return-marŝo li estis kiel ĉiuj aliaj nenion manĝinta. Ili faladis pro laciĝo, mortadis pro malsato kaj tamen ili devis vigle antaŭen marŝi en densigitaj vicoj. Kiu malfortiĝinte falis, tiu restis kuŝi, kaj kiu povis, tiu malaperis, forkuris, por ke li ie flanke en vilaĝoj pripetu al si pecon da pano.

La malsato supervenkis gloran kaj severan disciplinon *) de franca militistaro.

Malsato forpelis ankaŭ tiun ĉi soldaton kaj pelis lin tra kamparoj serĉi vilaĝon, kie oni ne lasus lin morti en fosaĵo apud vojo pro la malfortiĝo kaj malsato, kiel al li okazus, se li estus restinta en vicoj. Sed fremda regiono estis negastema.

La soldato antaŭe vane vagis tra kampoj, vane li serĉis. De vasta kampo li fine deiris en la herboriĉan valeton. Tra ĝi, kiel li pensis, plej eble li alvenos iun bienon, al kiu tiuj ĉi herbejoj apartenas. Sed eĉ tiame lia espero ne estis plenumita. La valetto estis dezerta kaj donis al li sole iom da sovaĝaj rozberoj, kiuj sole incitis la stomakon.

Li apenaŭ staris. Kaj super tio la pafilo estis tiel multepeza. Lia senfortiĝinta korpo apenaŭ povis ĝin porti kaj li jam kelkfoje intencis forĵeti ĝin. Jam unufoje li lasis ĝin kuŝi sur vojo, sed apenaŭ li iom forpaŝis, li revenis por ĝi. Ne estis eble disiĝi kun bona kunulo.

*) Ni kontraŭstaras la formon »disĉiplino«.

Nun li rigardis la sunon. Li kalkulis, ke ĝi post mallonga tempo malsupreniros, kaj kun teruro li rememoris baldaŭan krepuskon kaj malvarman aŭtunan nokton. Jam nun li ekstremis pro malvarmo, kiam akra vento ekblovis. La mantelo tre ruinigita per suferoj de la lastaj marŝoj kaj bataloj, kelkfoje pluvumita kaj apenaŭ jam sekiĝinta sur kelkaj lokoj jam ankaŭ disŝirita, ne sufiĉis al li.

Penso pri frosta oktobra nokto pelis malfeliĉan soldaton. Li iris kaj iris, propre li treniĝis, denove kiam li, trairinte dekstre kurbiĝon de valetoj, ekrigardis ĝian finon. Kaj kiam li ĝin atingis, li estis sur vojo sufiĉe larĝa. Tio ne estis lin multe ĝojiginta; sed, ke post la vojo, vere ankoraŭ malproksime, li ekvidis kelkajn domojn, tio lin ĝojigis. Antaŭ la krepusko li certe tien alvenos, kaj nun li povas ankoraŭ momenton ripozi. Sole momenton!

Li sidiĝis sur ŝtonamason kaj metinte pafilon apuden, li rigardis vilaĝajn domojn, kiuj blankiĝis tra klara aero de aŭtuna tago inter densaj arboj. Tiuj ĉi konstruaĵoj estis tutaj, ne forbruligitaj, kaj certe estos tie pano, kaj eble ankaŭ poteto da lakto. Kaj poste oni permesos al li kuŝiĝi sur la pajlon, eble eĉ al varma forno. Ho dio, dio; kiom ĉe ili hejme da ĉio, pano, viando, bona vino. Se la patrino —

Flava, enkavigita vango de la soldato malgajiĝis — sekaj, bluiĝintaj lipoj kunpremiĝis. Li klinis momente la kapon; eble lacigita, eble pripensante kaj rememorante. Kaj kiam li ĝin levis volante starigi sin, li ekvidis maldekstre sur ŝoseo, sed ankoraŭ tre malproksime, kelkajn virojn. Kelkafoje super ili io ekbrilis. Ĝi estis armilo. La soldato tion bone ekkonis. Li rigardis videble maltrankvilegita tien. Tiuj militistoj certe eliris el malgranda arbareto, kiun oni bone vidis de tie ĉi sur strato.

Kiuj estas? Amikoj aŭ malamikoj? La ĉasisto streĉis la rigardon. Li ekkonas jam ilin — ili ankaŭ estas Francoj! Li ekĝojis. Li atendas ilin. Sed ili paŝas tiel malrapide!

Kiam li ilin tiel diligente observis, li subite forte tremis. Tie apud la arbareto io ekblankiĝis, ekbrilis. Pro dio! Kelkaj kavaleristoj! Tio certe ne estas Francoj! Ho, li konas ilin — konas. Li volis ekkrii al samlandanoj, kiuj videble ĝis nun ne estas rimarkintaj venontan danĝeron. Sed lia gorgo ne eldonis voĉon. Li ekprenis la pafilon kaj kolektinte la tutan forton li svingis ĝin kaj faris signojn. Ne estas necese plu. Samlandanoj nun mem haltis kaj tuj sin turnis. Krio de malamikoj haltigis ilin. La soldato senmove rigardis antaŭen,

kio okazos. Jam pafado eksonis, dua, tria kaj ankaŭ la samlandanoj staris jam pretaj por sin defendi. Pafado post pafado; blankaj nuboj de fumo ĉirkaŭkovris la batalantojn — Sole jen kaj tie ekbrilis fulmantaj sabroj en sunbrilo. Sovaĝa kriegado eksonis tra la dezerta aŭtuna regiono.

La vaganta soldato momente observis tiun ĉi batalon kaj momenton li ŝanceliĝis. Li ekrigardis ankaŭ domojn tie inter arboj allogite blankiĝintajn. Sole kelkajn paŝojn kaj li malaperos de strato kaj li estos kaŝita antaŭ la malamiko.

Sed li jam ekiris supren sur la straton rapidante al siaj batalantaj amikoj. Sed, kia estis lia rapidiro! Apenaŭ li iom forpaŝis, la batalo estis jam finita. Pafado eksilentis, la vento disblovis fumon kaj sur la strato estis videblaj sole la rajdistoj. Ĉasisto haltis. Estis fino, liaj samlandanoj ĉiuj kuŝis sur la strato. Mortaj aŭ vunditaj. Li volis forsalti flanken en fosadon sed — jen — du rajdistoj ekvidis lin kaj furioze ekkriinte ili galopis kontraŭ li. Ceteraj, delogitaj de ili, sekvis ilin. Unu de tiuj du malproksime antaŭ ĉiuj.

Tio estas teruraj kirasuloj — li konatiĝis kun ilia atako apud Leipzig. Pripensado estis neebla. Li forĵetis la pafilon kaj streĉis siajn senarmilajn manojn kontraŭ la malamiko. Pli kaj pli proksime sonas terura bruado de galopantaj ĉevaloj, metala sabringo tintegas kaj krio de kirasuloj furioze tuŝas orelojn. Ili ne haltas — kaj la mano de la unua celas terure bati. Li ne rimarkas, ke li petas pardonon — li mortigos lin senarmilan. Jam, jam! Tiam Franco genufleksis kaj kunmetis la manojn. Je tiu muta petado responde eksonis terura malbeno, ekbrilis peza sabro; ruĝega sango elŝprucis en du potencaj fluoj. La vaganta soldato de Napoléon falis sur la malmolan ŝoseon plene makulita per la sango rapide ŝprucanta el la brakradikoj. Forhakitaj brakoj kuŝis proksime.

La kirasulo, kiu forhakis ilin per unu bato, grandegula, forta kaj vivoplena, viŝis la sabron per mantelo. En tiu momento algalopis ankaŭ ceteraj, ankaŭ kirasuloj en malblankaj kirasoj kaj blankaj manteloj, ĉiuj viroj grandaj kaj fortaj.

Juna oficiro ekvidinte Francon, ekteruriĝis kaj severe rigardante la grandegulan kirasulon, rapide ekkriis: »Kion vi faris«?

»Li estas Franco!«

»Sed li petis pardonon. Mi vokis vin.«

»Mi estis fervorigita, mi ne aŭdis.«

»Ke via mano ligniĝu! Tio estas insida mortigo, fripono«, kaj la oficiro tondre kriis al kirasulo, kiu kolere rigard-

ante klinigis la kapon. La oficiro desaltis de ĉevalo kaj kliniĝis al la malfeliĉa Franco kuŝanta en sveno.

Momenton poste unu el kirasuloj laŭ ordono de oficiro turnis la ĉevalon tien al izole starantaj domoj por venigi helpon, kaj la alia, farinto de tiu terura bato, galopis reen al eskadrono, kiu estis proksime post ili kaj havis kuraciston. Ŝajnis, ke tiu grandegula kirasulo volas mortpeli sian brunĉevalon. Tiel li rapidegis. Sed ĉio estis vana.

Pli frue ol helpo alvenis, estis jam ĉasisto de Napoleón'a militistaro mortinta. Kirasuloj forrajdis jam, Vilaĝanoj lasis la mortinton en fosaĵo apud la vojo por lin matene enterigi. Li kuŝis tie sola kaj li ne sciis, ke ekregis jam malgaja aŭtuna krepusko, ke sur la silentan regionon kliniĝis stelriĉa frosta nokto, kiun li antaŭe, kompatindulo, tiel timis. Forhakitaj, sangumitaj manoj kuŝis apud la mortinto. Sango sur ili jam sekiĝis kaj nigriĝis.

Sed freŝe, ruĝe sangumitajn vidis ilin ĝis nun tiu grandegula kirasulo. Li sidis sola aparte de kamaradoj kuŝantaj nemalproksime apud la fajro. La kirasulo fikse antaŭenrigardis kaj konstante li vidis kunpremitajn manojn de tiu kompatindulo, kaj li vidis ilin, eĉ se li turnis sin aliflanken, eĉ se li fermis la okulojn, eĉ kiam li fine ekdormis. Li vidis ilin klare, ruĝe sangumitajn, terure brilantajn en mallumo. —

II.

El la generacio de maljunaj militistoj batalintaj kontraŭ Napoleón estis jam en nia ĉirkaŭaĵo sole du. Maljuna Kudrna kaj Vlček. Maljuna Kudrna estis malriĉulo kaj li petis almozon, freŝa maljunuleto, blankhara kun la kanonkruco sur la brusto. Kaj tiu ĉi maljuna bonegulo ĉiam ridetis, ĉion volonte akceptis kaj al ni infanoj ofte ion rakontis, iun fabelon, aŭ ion pri fremdaj landoj, kiujn li konis trairinte ilin kiel militisto.

Maljuna Vlček, homo kvazaŭ monto, sed jam antaŭen kliniĝanta, kun la sulkiĝintaj kaj enfalintaj vangoj, fartis pli bone. Li estis ĉe sia filo, biengardisto. Sed li kaj Kudrna! »Vlček el la bieno« kiel oni lin nomis, malofte ekridetis kaj neniam li ŝercis. Li ĉiam iradis vestita per militmantelo, sur kiu brilis kanona kruco, ĉiam, eĉ en aŭtuno, kiam li en parko gardis kaj fumis, eĉ dum somero, kiam li inspektis laboristojn kaj fumis. Li malmulte parolis kaj li ofte estis malbonhumora kaj malafabla.

En la lasta tempo oni rimarkis, ke li ofte palpas kaj observas la dekstran manon, kaj kiam li iom povis, li sidiĝis sur benketon antaŭ la bieno sur la lokon lumigatan de la suno kaj tie forŝovinte la manikon de la militmantelo, varmigis harriĉan, vejnoplenan brakon per varmaj sunradioj.

Tiel lin unufoje tie trafis la kuracisto, kiu vizitis mal-sanan filinon de la bienestro kaj kiun tiu ĉi akompanis. Juna doktoro, kiu estis tie ĉi la unuan fojon, rimarkis la invalidon kaj demandinde pri li, li komencis kun li paroli.

»Kie vi militservis?«

»Ĉe kirasuloj.«

»Ĉe kiuj? Ĉe bohemiaj?«

»Jes, ĉe Lotringenaj, numero 7.«

»Kie vi batalis?«

»Apud Leipzig kaj en Francujo.«

»Ĉu vi estis vundita?«

»Eĉ ne unufoje.«

»Mi pensis, ke eble sur la brako. Vi varmigas ĝin. Ĉu vi sentas doloron?«

»Jes«, diris maljuna kirasulo kaj kuntiris densan grizan brovon. »Ĝi ligniĝas.«

La doktoro ekridetis.

»Montru ĝin,« kaj li observis vejnoplenan, fortikan manon, kiu estis certe havanta grandegan forton.

La kirasulo iom ne volonte donis la brakon kaj tenis ĝin, kaj kiam poste la kuracisto, malkaptinte ĝin, diris, ke li donos al li recepton por kuraci ĝin, la kirasulo iom strange ekridetis kaj diris:

»Tio restos sensukcesa.«

»Kiel vi tion scias?«

»Tial, ke mia mano ligniĝos.«

»Kaj kial?«

»Hm, tial —«

Sed li diris nenion plu.

La bienestro faris signon per okuloj al la kuracisto kaj tiu ĉi levinte la ŝultrojn diris al la malgaja invalido:

»Kiel vi pensas. Pripensu tion! Morgaŭ mi venos denove.«

Ambaŭ sinjoroj foriris parolante pri murmuranta maljunulo. Tiu ĉi neniel zorgante pri ili streĉis denove sian nudigitan brakon kontraŭ la suno kaj varmigante ĝin, li observis ĝin kun malgaja rigardo.

La sekvantan tagon, kiam la kuracisto refoje alvenis, oni vane serĉis la maljunan Vlček. Li estis nek en la bieno, nek en la parko.

»Li ne deziras mian helpon,« diris la kuracisto. »Eble li ne konfidas la kuracistojn.«

»Mi ne opinias, ĉar iufoje, kiam la knabeto de lia filo ekmalsanis, la maljunulo mem rapidis en la urbon nokte, kvankam la filo kaj la fianĉino lin retenis.«

»Mirinde.«

Tiumomente preteriris la biengardisto kaj la bienestro alvokinte lin, rakontis al li, kiel lia maljuna patro estas obstina.

»Ho, ne, Via moŝto,« respondis la biengardisto turninte sin al la kuracisto. »Li ne estas kontraŭ medicinoj, sed tio tie ĉi — kiel mi dirus — tio estas — konscienco. Li konjektas, ke tio estas puno, ke la dio tiamaniere rememoris lin. Vere li nenion diris al mi nun, sed kiel li unufoje antaŭ multaj jaroj rakontis al mi —«

La biengardisto rakontis al la sinjoroj, kiel lia patro, en militservo, post la Leipzig'a batalo, kiam oni persekutis la malamikon, forhakis la manojn al unu Franco.

»Longe li ne povis tion forgesi ĉiam vidante tiun kompatindulon« daŭrigis la biengardisto. »Sed post jaroj li tamen forgesis; sed nun en la maljuneco refoje. Kaj nun, kiam lia mano senfortiĝas, li denove pensas pri tio, li denove tion vidas.«

»Kaj li faras penton,« aldonis la kuracisto. »Li volas suferi —«

Kiam li estis revenanta hejmen, li ekvidis sur kampo apud vojo la maljunan grizan Vlček sur kamplimo. Li sidis kliniĝinte en kaduka militmantelo; sub aŭtuna, hela suno brilis sur ĝi kanonkruco.

»Tie li sidas, kompatindulo,« pensis la kuracisto. »Kiam li sidis en kiraso sur ĉevalo, homo kiel monto, fortoplana, sana kaj nun —«

Kaj la kapon de la kuracisto trakuris vorto dirita de la filo de l' eksmilitisto:

»Konscienco.«

III.

Post iu tempo venis al la kuracisto mirinda sciigo. Li devis veturi al la maljuna Vlček. Lia filo, biengardisto, mem alveturis.

»Kio okazis al la maljunulo?« ekkriis la doktoro. »Al lia mano vi certe ne vokas min.«

»Jes, sinjoro, ĝuste kaŭze de ĝi.«

La kuracisto tre miregis. Kaj la biengardisto rakontis pri malfeliĉo, kiu okazis al la patro.

»Mia plej maljuna knabo, kvinjara, vagis sur la korto ĉie serĉante, ĝis li alvenis al ĉevalejo. Ĝi estis malfermita kaj kuraĝuleto eniris tien. Li volis vidi ĉevalidon, kiu estis malantaŭe en fako post barilo. El stalservistoj eĉ ne unu estis en ĉevalejo. Mi ne scias, kiel ĉio okazis, ĉu la knabo per vergo svingis, aŭ kio, subite en ĉevalejo okazis grandega bruo. Ruĝĉevalo, tiu kun blanka makulo, vi eble ĝin konas, ĝi estas sovaĝa besto, komencis salti, piedbatis, mordis sian najbaron, kaj post nelonge ĉiuj tri ĉevaloj batis unu la alian kaj piedjetis. Ili blekis, frapis ĝis ligneroj flugis de planko. Kaj nia Joĉjo inter ili! Li kriis, ploris, sed neniu aŭdis lin. En tiu momento preteriris mia patro, kaj volante kriegi je ĉevaloj li ekvidas apud muro la nepon morte terurigitan kaj kriantan. La patro ne meditis longe. Li kriegis ĉevalojn, batis la ruĝegulon, kiu staras ĝuste apud pordo, kaj tuj li saltis inter ilin kaj ĉirkaŭprenis la nepeton — per maldekstra mano por malproksimigi lin de ĉevaloj. Kaj ree eksteren. Bone li faris tion — li estas ja maljuna rajdisto — sed ĝuste apud la pordo tuŝis hufo de ruĝĉevalo lian dekstran manon. Tio ĉi lin ekdoloris, sed li ne zorgis multe pri tio. Li eĉ ne diris unu vorton. Longe ni nenion sciis, ĝis kiam aperis granda vundo, kaj eĉ tiam li protestis ne dezirante kuraciston. Vi scias, sinjoro, ĝi estas dekstra mano«.

La kuracisto jesis, ke li komprenas.

Li trafis maljunulon sidantan apud lito. Li fumis. Preninte la pipon el la buŝo li komencis laŭ la postulo de la kuracisto malvolvi bandaĵon. La kuracisto longe observis la vundon kaj lia rigardo estis pli kaj pli malheliganta. Poste levinte la kapon li ekrigardis maljunan kirasulon, kiu fikse rigardis liajn okulojn atendente diagnozon.

»La vundo estas neprizorgita — osto — Estos necese —«

»Tranĉi« — aldonis la eksmilitisto, kaj liaj okuloj iom pli rapide ekpalpebrumis. La edzino de la filo paliĝis kaj ekplorinte eliris. La biengardisto estis konsternita. Plej trankvile tie ĉi sidis maljuna Vlček. Momentan silenton, kiu okazis, li interrompis per la vortoj:

»Mi bone sciis tion. Ĝi estas puno. Dia volo estu plenumita.«

La sekvantan tagon oni forveturigis lin en urbon en malsanulejon.

Kuracistoj miris la resignacion kaj kuraĝecon, kun kiu li entreprenis operacion minacantan la vivon.

Li savis ĝin al si.

Kaj li denove iradis poste sur korto kaj li denove sidadis en parko kaj sur benketo antaŭ la bieno. Sed la dekstran manon li ne varmigis tie plu je la suno. Trans brakradiko pendis maniko de militmantelo, sur kiu estis brilanta kruco.

Sulkiĝinta vizaĝo de la maljuna kirasulo ne estis plu nubigita kaj malafabla.

»Certe li havas nun, maljuna kompatindulo, pli trankviligitan konsciencon,« diradis la filo, kaj aldonis: »Li ankaŭ multe suferis kaj havis certe pli da doloro ol tiu malfeliĉa Franco«.

Kaj kiam iu fremdulo vidis maljunan grandan kirasulon, kaj malplenan lian manikon anstataŭ dekstra mano, li juĝante laŭ kanonkruco sur lia brusto ĉiam demandis:

»Vi certe perdis la manon en la francaj bataloj?«

Kaj maljuna Vlček ne respondis, ke ne, sed li diris:

»Tion mi havas de francaj bataloj.«

Kaj li diris la veron.

(Verkita en 1887, tradukita en 1908.)

LA ORA TREZORO.

Bohema fabelo de K. J. Erben tradukita esperanten de B. S. E. — (Fino).

Li miris, ke li ne vidis ranon, sed sole maljunan virinon, kiu tra ĝardeno promenadis. Tion li nemulte rigardis kaj rapidis hejmen, kie oni lin jam longe atendis. Gaje li antaŭmetis la ringon, kies valoron li ne konis. Ankaŭ tiam Petro akiris la venkon, ĉar lia ringo estis la plej bela. La fratoj jam pensis, ke por ili estas ĉio perdita. Sed la patro ree diris: »Miaj infanoj, per tio nenio estas decidita; sole tiu ricevos la oran bienon, kiu alkondukos morgaŭ la plej belan kaj la plej bonan fianĉinon.« Plenaj de gajeco eliris du pli maljunaj fratoj al siaj riĉaj fianĉinoj kaj ili estis pri la venko konvinkitaj, ĉar Petro ne kuraĝis ekrigardi en okulojn de junulinoj, tiom malpli eĉ paroli kun ili kaj esprimi al ili sian amon. Senespere li

iris denove post la bienon; li ekmemorigis je sia ĝisnuna bonfarantino, sed peti de ŝi fianĉinon li tamen ne kuraĝis. Malrapide li promenadis en ĝardeno. Kiam neatendante li ekaŭdis refoje konatan voĉon, kiu demandis lin pri kaŭzo de lia malgajeco, li respondis: »Kiel mi ne devas esti malgaja, hieraŭ mi pensis, ke mi jam akiris la oran bienon, sed nune la patro promesis ĝin sole al tiu, kiu morgaŭ alkondukos por si mem la plej belan fianĉinon. La fratoj min multe mokos, kiam mi revenos sola.« La rano ĝojigis lin per tio, ke ŝi promesis al li helpon. Rapide ŝi enkondukis lin en sian loĝejon, kie ŝi diris ŝerce al sia filino: »Dufoje vi helpis al la junulo, per tuko kaj ringo, sed la patro deziras ankaŭ vidi lian fianĉinon. Ni ambaŭ faris al li tiom da espero kaj nune ni permesus, ke li estu mokata de siaj fratoj? Iru, prezentu al li la manon por fianĉigo.« Sed la knabino ridetante respondis: »Ĉu vi scias, se ankaŭ li volas esti mia fianĉo?« Ĉia timo forlasis Petron dum tiel afablaj vortoj kaj li diris: »Tre volonte! Sole je vi mi senĉese pensis, sed mi ne kuraĝis esprimi mian sopiron.« Ili baldaŭ interkonsentis kaj la junulino iris por vesti sian fianĉan robon. Post momento ŝi revenis kun sia patrino kiel bele, lukse vestita fianĉino. Petro senhezite alkondukis ŝin al la patro, kiu multe miris, ke ankaŭ Petro fianĉiĝis kun knabino. Ne longe poste eniris ankaŭ du ceteraj kun fieraj fianĉinoj. Jen ordonis la patro, ke ĉiu kun la sia ekdancu galopon. Longe ĝi ne daŭris kaj al ĉiuj tri belulinoj deflugis la supra vestaĵo, ĉar ĝi pendis sole facile sur la korpo. La fianĉino de Petro havis nun ankoraŭ pli belan vestaĵon; tiam ili ambaŭ staris tie en tute ordinaraj vestoj. Kun miro komencis nun la patro: »Mi jam vidis antaŭe, ke ŝi estas plej belkreska, sed tion mi ne pensis, ke ŝi havas sub la nebela supra vestaĵo ankoraŭ pli belan kaj pli luksan robon. Vidu, al Petro, kontraŭ mia atendo, donacis la feliĉo oran bienon.«

Poste li alpaŝis al la fianĉino de Petro kaj salutis ŝin kiel bofilinon. Ĉar la patro sciis, ke la pli maljunaj fratoj enius al Petro hejme kaj lin ofendus, li donis al ili multe da mono, ke ili mem aĉetu al si siajn bienojn kaj mem mastrumadu.



KRONIKA A KOMENTÁŘ.

První schůzka moravských esperantistů konati se bude ve dnech 13.—15. srpna 1910 v Luhačovicích. Program dle dosavadních dis-

posic je tento: V sobotu dne 13. srpna od 8 hod. večer bude seznamovací večírek účastníků v sále lázeňské čítárny s programem hudebním, zpěvním, a deklamatorním (pí Glücksmannová, zpěvácký spolek luhačovický atd.). V neděli dne 14. srpna dopoledne (od 9 hod.) veřejná schůze propagační v sále lázeňské čítárny, kde promluví p. uč. Jos. Krumpholtz »O významu esperanta pro povznesení návštěvy cizinců vůbec a Luhačovic zvláště«, p. dr. Stanislav Kamaryt »O rozšíření esperanta« a jiní řečníci; před touto schůzí je hromadná návštěva promenádního koncertu, po schůzi návštěva symfonického koncertu (účastníci buďtež opatřeni esp. odznaky!; ve 2 hod. je společný oběd v hotelu »U Krajičků« (couvert à K 2.40; přihlášky přijímá p. uč. Joža Mareš v Luhačovicích) a po obědě prohlídka lázní; večer o půl deváté hod. je esperantský debatní večírek o thematu »Pri manieroj de la propagando«, který zahájí p. dr. Stan Kamaryt přednáškou »Ĉu idea movado povas esti neŭtrala?« V pondělí dne 15. srpna konají se veřejné zkoušky z esperanta (přihlášky ke zkouškám přijímá Dr. Stan Kamaryt (t. č. ve Velešíně v Čechách). Schůzky účastní se jako hosté také četní esperantisté z Čech a z ciziny. Není zajisté třeba vykládati obšírně propagační důležitost tohoto sjezdu a upozorňovati na význam a kouzlo osobního seznámení se s domácími i cizími přáteli společné myšlenky, i doufáme proto, že nejen všichni esperantisté moravští, ale i četní esperantisté z Čech a Rakous sejdou se v nejkrásnějších lázních slovanských, aby ukázali sílu esperantského hnutí u nás a aby poznali místo, které vábí k sobě všechny Slované. (Informace podává, programy zasílá a přihlášky přijímá p. Mil. Schmidt, sekretář »Svazu českých esperantistů« v Praze 11., Hybernská ul. č. 1036/XIV.) S. K.

Rakousko-uherské ministerstvo železnic a esperanto. »Amtsblatt der k. k. Nord.-West. Eisenbahn-Direktion« (Úřední list c. k. ředitelství pro severozápadní dráhu) uveřejňuje (Čís. 30./1910) pod titulem »Nutzbarmachung der Esperantosprache zu Zwecken des internationalen Verkehrs auf Eisenbahnen« (Upotřebení jazyka esperanto v mezinárodním styku na železnicích) tento oběžník (č. 302): Na rozkaz c. k. ministerstva železnic došel jistý počet výtisků brožury J. Borela »Die Frage einer internationalen Hilfssprache und das Esperanto« (Otázka mezinárodního jazyka pomocného a esperanto) k rozdáni hlavně mezi personál přicházející ve styk s mezinárodním obecnstvem. Při tom se upozorňuje, že »Svaz rakouských spolků německých esperantistů« (»Verband der deutschsprachlichen österreichischen Esperantistengruppen« in Wien I., Stubenring 18) podává informace o esp. a pořádá bezplatné vyučovací kursy tohoto jazyka. Vjt.

První mezinárodní sjezd katolíků esperantistů odbýval se ve dnech 30. března až 1. dubna 1910 v Paříži se svolením arcibiskupa Amettea a za protektorátu a osobní účasti monsignora Baudrillarda, rektora katolické university. Dokonce sám papež projevil o sjezd, jehož účastnilo se přes 450 katolíků 17 národností, svůj zájem a poskytl účastníkům plno-

mocné odpustky. Sjezd konal se ve velkém sále pařížské katolické university (Institut Catholique), hlavního to střediska katolického vyučování v Paříži. Na sjezdu jednáno bylo — výhradně esperantsky — o jednotě církve, náboženském vyučování, sociální činnosti, materiální i praktické organizaci katolické jednoty a pod. Ejhle: přece esperanto spojuje i katolíky, ač mnozí klerikálové prohlašují je za »podnik svobodných zednářů« (jako u nás »duchaplný« páter Kopal)! *Hkb.*

Subvence městských rad esperantistům. — V Hannoveru (Něm.) městská rada subvencuje místní klub esp. obnosem 300 M (150 Sm.). — V Armentières (Franc.) dostala od města skupina esp. mládeže (»Eston-teco«) podporu 150 fr. — V Ruen (Francie) místní spolek esp. dostal městské subvence 500 fr. *Nemo.*

Rozmanitost z esperantského hnutí. — Na výstavě mohamedánského umění v Mnichově r. 1910 věnoval výstavní výbor zvláštní kancelář esperantu a vydal esper. prospekty o výstavě. — V 15 městských školách v Rio de Janeiro jsou pořádány kursy esp. — V Belgii založen (15. V. 1910) svaz esperantské mládeže (Belga federacio de la junaj esperantistoj). *Kronikář.*

Esperanto na vyšší dívčí škole v Přerově. V prospektech literární, jazykové a praktické vyšší dívčí školy »Božena Němcová« v Přerově uvedeno jest mezi jazyky, jimž se na ústavě vyučuje, také esperanto. *Fch.*

Esperantské informace o Prostějově obsahuje »Gvidfolio tra Prostějov« vydané místním klubem esperantistů pod záštitou »Universálního svazu esp.« Na dvoustránkovém monoformátovém letáku jsou stručné esp. informace o všem, co cizího návštěvníka může zajímat. Je to, pokud víme, první esp. letákový průvodce českým městem. Druhý vydali esperantisté v Rožnově. A v Praze? *Nemo.*

Den esperantistů na výstavě v Nasavrkách. Na popud místních esperantistů pořádána bude dne 21. srpna na okresní hospodářské a průmyslové výstavě v Nasavrkách schůzka esperantistů, k níž výstavní výbor zve veškeré spolky esperantistů i jednotlivé esperantisty, zejména z kraje chrudimského. Výstavní výbor žádá také za případné zaslání esp. časopisů, knih, pohlednic a pod., aby je v literárním odboru mohl vystaviti. Bližší informace sdělí výstavní výbor (předsedou je p. Dr. Ed. Pinz, c. k. notář). Doporučujeme esperantistům českým návštěvu této moderní výstavy i krásné krajiny chrudimské uvedeného dne. *Red.*

České přednášky o esperantu. — V Praze pořádal »Klub malostranských esper.« dne 17. února 1910 več. v místnostech malostranské besedy přednášku »O struktuře esperanta«, kterou proslovil pan H. K. Bouška. Po přednášce uspořádán byl bezplatný kurs esp. pro začátečníky. — V Liboci u Prahy přednášel dne 24. dubna o 3. hod. odp. v host. p. Švarce p. H. K. Bouška »O esperantu a jeho významu pro národ český«. Přednáška byla hojně navštívena a vedla k založení kursu a klubu. — V Hronově n. M. přednášela dne 3. 11. 10 v měsíční poradě učit. sboru obec. a měšť. školy dívčí »O jazyce mezinárodním a esp.« známá propagátorka sl. Šupichova, která svoji přednáškou vyvolala neočekávaný zájem o esp. a touhu po kursu esp. — V Trutnově v hotelu Střelnice přednášel 27. VI. 10 p. Šilhart o významu esp. pro železniční zřizence. — V Jičíně v radnici přednášel 5. VI. 10 — při příležitosti výletu esperantistů ze sev.-vých. Čech do Jičina a Prachovských skal — p. Procházka

o významu a vývoji esp. — V Čáslavi přednášel o esp. p. Horáček. — Paní Běla Raichlová, choť správce školy (Lomy u Dobrušky) přednášela o esp. v městech svého okolí a řídila kurs esp. v časopise »Hlasy od Metuje«. — V Ivanovicích na Hané přednášel 6. III. 10 v sokolovně p. uč. Krumpholc o užitečnosti esp. Na schůzi dne 20. III. 10 mluvil o esp. v »Besedním domě« p. uč. Kupka. — Ve Zlíně a Malenovicích přednášel o esp. p. Jan Šembera, odb. uč. ve Slavkově. *Kronikář.*

Kursy esperanta pro Čechy. — V Praze pořádal »Klub malostranských esp.«
bezplatný kurs esp., který řídil p. JUC. Barviř. — Ve Dvoře Králové vedl p. uč. Zlatník kurs esp., pořádaný odborem »Českoslov. obch. besedy«. — V Nasavrkách odbýval se (1. IV. 10—15. VII. 10) péči okres. vzdělávacího odboru kurs esp. v hotelu záložny (stř. 8—9 več.), kde učil p. J. Šukal 15 osob. — V Jičíně konal se kurs od dubna do června. — Na Horách Kutných konán byl kurs pro začátečníky (od 19. II. 10) i pokročilé (od 11. II. 10). — V Čes. Budějovicích byly pořádaný kursy v hostinci »Na rychtě«, »U Krumlova« a v učitelském ústavě; učili pp. Hájek a Svačina. — V Bystřici pod Host. konal se třetí bezplatný kurs esp. v sále hotelu »U města Vídně«; kurs pořádan byl od 23. II. do 15. IV. 1910, každý čtvrtek 2 hodiny a účastnilo se ho 24 osob, jež učil p. uč. Krumpholc. — V Telči pořádal »Akademický spolek« kurs esp. od 1. I. do 30. IV. v místnostech obecné školy chlapecké za účasti 30 osob a za vedení p. prof. Kasalého; týž pořádal také (na podzim r. 1909) krátký (10hodinný) informační kurs esp. pro žáky vyšší zem. reálky. — V Litovli konány od 1. XII. 09 do 31. III. 10 v budově české reálky dva kursy: veřejný (200 posluchačů) a studentský (30); vyučoval p. prof. Kl. Urban. — Ve Chvalkovicích vyučoval až do konce dubna pan uč. Neužil. — Ve Zlíně učil esp. pan učitel J. Šembera. — Na Vsetíně konán kurs esper. pro učitele (ve čtvrtek). *Kronikář.*




ZPRÁVY SPOLKOVÉ.

Svaz českých esperantistů obrací se ku všem českým esperantistům v král. Českém s vyzváním, aby hojně účastnili se I. schůzky moravských esperantistů v Luhačovicích (ve dnech 13., 14. a 15. srpna 1910). Svaz očekává, že mnoho hostů z Čech použije vhodné příležitosti, aby poznali světoznámé lázně slovanské, aby seznámili se se samideány moravskými, aby hojnou účastí povzbudili moravské pracovníky v jich činnosti.

Klub esperantistů v Liboci-Hvězdě pořádal dne 29. června o 3. hod. odpo. v restauraci p. Švarce ustavující valnou hromadu. Schůzi, jíž účastnili se četní hosté (17), zejména delegáti Svazu čes. esp., Čes. společnosti esp. a Klubu malostranských esperantistů, zahájil p. G. Novák, načež byly schváleny stanovy, přečteny pozdravné dopisy, a po prosloveh delegátů spolků (p. Barviř za S. č. e., p. Stejskal za Č. s. e., p. Iglauer za K. m. e.) zvolen výbor a jmenování čestní členové. Čestnými členy jsou Dr. L. Zamenhof a p. Iglauer. Členy výboru jsou pp.: J. Körtus (předs.), St. Vohánka (místopř.), Konopásek (jedn.), J. Novotný (pokl.), V. Žižka (zap.). Revisory jsou pp. J. Beran a V. Matějovský. Náhradníky jsou pp. V. Beran a K. Částka.

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

 Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!



Esperantské nálepky

100 kusů poštou vyplaceně za K — 70
500 » » » » » 270
Bez poštovní zásilky o 10 hal. méně.

Esperantaj glumarkoj

100 ekzempleroj Sm. — 135
500 » » » » 140

liverataj de **J. Iglauer, Praha III.-495, Bohemujo.**



JOSEF MALÝ,

Praha VII., Na Výšinách

fabrikas specialan komodan matracon
»Esperantan komodon«. Presarojn kaj
☆ informojn oni donas senpage. ☆

Trika

punčochy - ponožky - rukavice

vyrábí a nejlevněji dodává

HUGO SVOBODA,

Král. Vinohrady, Palackého tř. 12 n.



Chráněno.

Vkusné odznaky esperantistů

(emailované, trvanlivé) ve formě jehlice, brože neb knoflíku (za 60 hal., poštou 70 hal.) a **esperantské hvězdy** (kravatové jehličky za 40 h) — obě zákonitě chráněné — lze objednat u

„České společnosti esperantistů“

v Praze, Zemská banka.



FR. SKRČENÝ

V PRAZE, VODIČKOVA ULICE 32.

Filiálka: Příkopy, č. 27 n. „Velký Bazar“

doporučuje ve velkém výběru za velmi levné ceny:

Lampy, lustry, ampule, sklo, sklenice na pivo, víno, vodu a likéry. **Porcelánové** příbory jídelní, na kávu a čaj. **Domácí a kuchyňské nádobí. :: Úplné vybavy pro nevěsty. :: Cenníky zdarma.**

Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!

Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice esperanta.** Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholtz. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 2. **Slovníček esper.-český.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 30 h, poštou 33 h.
Sv. 4. **Methodická učebnice esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky) Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholtz. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátu K 1'10, poštou K 1'20.
Slovník česko-esperantský (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka. Cena 90 h, poštou 95 h.

Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice esperanta.** Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholtz. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1'50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de esperanto**“.
Sv. II. **Slovník esper.-český** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2'50, poštou o 10 h více.
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.
Sv. IV. **El la historio de esperanto.** Obsahuje Dr. L. Zamenhofův „List o původu esperanta“ a zajímavou řeč Dra K. Beina a Dra L. Zamenhova, proslovenou na I. kongresu esperantistů 1905. — Cena 30 h. Spisek tento hodí se znamenitě k dalšímu cvičení v esperantu, zvláště pro výborný sloh esperantský.

Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Český esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5'50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zapravení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostýn, Morava.**

Propaganda. Nejvhodnější pomůckou propagační je „**Esperanto na jednom listě**“. Úplná mluvnice a slovník esperantsko-český (obsahuje všechna základní slova, na 2000 kmenů, tedy skutečný klíč k Esperantu)! — 1 výt. za 2 h, 10 výt. franko za 20 h, 50 výt. za 55 h, 100 výt. za 1 K, 500 výt. za 3 K, 1000 výt. za 5 K. — Za obnos předem obdrženy (i v poštovních známkách) zasílá **Th. Čejka, Bystřice-Hostýn, Morava.**

La plej saniga trinkaĵo estas tutmonde konataj senalkoholaj **ŝaŭmantaj limonadaj bonbonoj de Maršner** (kun gusto framba, citrona, fraga, ĉeriza) por preparo de bonega re-freŝiga senalkohola trinkaĵo.

Nefalsita sole
kun jena
protektmarko.



Nefalsita sole
kun jena
protektmarko.

Ĉie ricevebla, kie estas afiŝoj kun protektmarko, kiu estas sur ĉiu aparta bonbono. Jara produkto 60 milionoj da pecoj. Lu-Sin parfumas la spiron. Klairon, la plej ŝatata frandaĵo de nova tempo. Bouchées à la reine. Peppermint-Lozenges. Ĉiujn specojn de ĉokoladoj laktaj, kuirotaj kaj frandaj la plej bonkvalitaj proponas

První česká akc. společnost továren na orientálské cukrovinky a čokoládu na Král. Vinohradech dříve **A. Maršner** (Unua bohema akcia societo de fabrikoj de orientaj sukeraĵoj kaj ĉokolado en Král. Vinohrady, Bohemojo, antaŭe A. Maršner).

Vendejoj: **Praha I., Ferdinand. tř. (Platýz). Praha II., Václavské nám. Wien VI., Theobaldgasse 4.**